

LA
PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII, SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.—; fremdlando Kč 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Ecepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
 lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Pošta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271.

Th. Ĉejka:

JOSEF KRUMPHOLC A ESPERANTO.

Vzpomínka k jeho šedesátce.

S kolegou Krumpholcem seznámil jsem se, když se přistěhoval z Fryštáku do Bystřice p. Host. Z počátku stýkali jsme se jen jako kolegové-učitelé. Tehdy jsem už měl vydány první příručky Esperanta, mezi nimiž zejména prvou větší učebnici za spolupráce kolegů Holuba a Bilíka. — Redaktorské a vydavatelské zkušenosti i strasti-slasti poskytly mi časopisy „Revuo Internacia“, „Český Esperantista“ a také „Der deutsche Esperantist“. Na tehdejší moje mládí bylo toho dost a dost.

Při častém styku s Krumpholcem — bydlili jsme v téže ulici — s počátku jsme o Esperanto ani nezavadili. Nemám totiž ve zvyku propagovati tam, kde nevidím zájmu, potřeby nebo nebyli dán popud dotazem s druhé strany. Až kdysi po půl roce, nebo snad ještě později projevil Krumpholc zájem o Esperanto, ale pravil, že pro množství práce školní a ještě více mimoškolní nemá naprosto času, aby se dal do učení. Pomyslil jsem si, že to nevádí, ale vhodný okamžik byl tu. Dopsal jsem příležitostně známému esperantistovi v cizině, aby občas napsal Krumpholcovi pohledku nebo lístek s nějakým dotazem. Vyhověl rád a už to začalo, neboť kolegu Krumpholce netřeba učit zdvořilostí a zejména ne zdvořilostí „mezinárodní“. Kdo se jed-

nou zaplete do korespondence s cizími esperantisty, je získán pro ideu pomocného jazyka mezinárodního navždy. Tak bylo i s Krumpholcem. A že sklonu k tomu měl dosti, stačí vzpomenouti si jen na Komenského a Krumpholcův poměr k němu a jeho snahám pansofickým. Krumpholc se Esperantu neučil pro nedostatek času, ale s cizími esperantisty korespondoval (pomocí slovníku a sem-tam nějaké letmé vysvětlivky). Do té doby padlo nové vydání mé „Úplné učebnice Esperanta“. Chtěl jsem, aby učebnice byla jiná, nežli prvá, a po každé stránce dokonalejší. V Esperantu byl jsem „doma“, ale ne v Gebauerovi. Měl jsem ho sice jako „Časista“ dávno rád, ale to bylo pro jeho vystoupení ve sporu o Rukopisy a ne pro jeho gramatiku, která za mých studií byla v Příboře naprosto „terra incognita“. Ale nač také shánět Gebauera a potřebný čas k jeho studiu, když na dosah ruky byl Krumpholc? Dohodli jsme se brzy: v nové učebnici bude esperanto mojí a čeština jeho starostí.

Spolupráce se nám dařila nad pomýšlení, a když byla kniha — po všech těch nekonečných korekturách — hotova, byl z Krumpholce opravdový a skoro kutý esperantista a ze mne jaký-taký češtinář. Ale teď nastala starost o honorář (totiž jen s mé strany,

Krumpholc o takové věci nestaral se nikdy). Pro mne jako nakladatele knihy, byl to dosti těžký problém: učitelského platu jsem měl necelých 100 K měsíčně a v tiskárně přes 10.000 předválečných korun dluhů. (Mohu to snad na sebe prozradit, že ony tiskárenské dluhy bývaly mými jedinými dluhy v životě i při tom malém učitelském platu.) Ať si tedy nikdo nemyslí, že Esperanto bylo v té době (a vůbec i dnes) na zbohatnutí. Naopak, dnes vidím, že to, co jsem tehdy ve svých finančních poměrech podnikal, lze nazvat bez nadsázky šílenou odvahou. Ještě dobře, že mládí nebývá tak ustarané jako stáří — jen tak lze si vysvětlit, že jsme si oba poskytli za svou práci honorář v podobě cesty na nejslavnější esperantský kongres v anglickém universitním městě Cambridgi, kam jsme jeli ještě za doprovodu jednoho dobrého kolegy esperantisty Jos Grně. Aby naše cesta nemusela být přímá a tím nejkratší, zvolili jsme turu: Vídeň, Mnichov, Norimberk, Frankfurt n. Moh., Wiesbaden, Rudesheim, Kolín n. R., Cáchy, Amsterdam s odbočkou do Hilversum, Blaricum a Naardenu, dále pak Haarlem, Leyden, Haag s mořským kupalištěm Scheveningen, Rotterdam, Antverpy, Brusel, Ostende, Dover, Londýn, Cambridge, Londýn, Southampton, Le Havre, Rouen, Paříž, Dijon, Neuchatel, Bern, Luzern, Zurych, Schaffhausen, Kostnice, Breženz, Vídeň. (Uvádím jen místa, kde jsme se zastavovali na delší dobu; v Cambridgi a Londýně pobýli jsme po týdnů. A připletl-li jsem snad mezi naše štace v Holandsku nebo Belgii některou, v níž jsme spolu nebyli, pak to patří na účet mé druhé cesty do oněch zemí, a stárnoucí už paměti. Přítel Krumpholc to jistě vystihne ihned a také promine.) To byl tedy honorář (pro oba za vše asi 1000 K při jízdě 2. tř.), s nímž jsme byli oba spokojeni a jenž nás posílil k další práci.

To jest jedna epizoda z našeho dosti dlouhého spoluzití, které nebývalo nikdy vážněji zkwaleno, což je při povaze takového přítele jako je Krumpholc, samozřejmé.

Vzpomínky a epizody další nutno ponechat ještě na jubilea další, neboť

Krumpholc vždy tvrdil a jistě ještě i dnes tvrdí, že se dožije věku přes 100 let. A tu začínám mít obavu, že snad ani po desítkách nevystačím s líčením naší první cesty na esperantský kongres do Ženevy (zase ne přímo a ne příliš krátce) zeměmi alpskými na Terst a severní Itálii tunelem Mont Cenis do Francie atd., cesty na kongres v Drážďanech a j. O své vlastní studijní cestě do Dánska, kde se za 6 neděl stal už opravdu dokonalým esperantistou, jsa po celou tu dobu odkázán jen na sebe a kde bylo mu pronésti mnoho improvizovaných přednášek o různých tematech, jak v esperantských klubech, tak v některých vyšších školách i při jiných příležitostech — ale to by nám měl vlastně vyprávět sám. — O jeho propagační práci pro Esperanto a myšlenku mezinárodního jazyka, byla by další a velmi obsáhlá kapitola.

(Jako rukopis psáno pro „Věstník“ Ústřed. spolku jednot učít. na Moravě.)

ĈEFAJ PRINCIPOJ DE LA HUMANECA ETIKO.

La IXa ĉapitro el la ĉeĥa verko de T. G. Masaryk „Idealo de la humaneco“ esperantigita de H. K. Bouška.

Noto de la tradukinto: „Idealoj de la humaneco“ (serio de publikaj paroladoj el la jaro 1901. pri ĉefaj etikaj sistemoj) enhavas jenajn ĉapitrojn: I. Enkonduko, II. Socialismo, III. Individualismo, IV. Utilitarianismo, V. Pesimismo, VI. Evoluĉismo, VII. Pozitivismo, VIII. Nietzsche, IX. Ĉefaj principoj de la humaneca etiko. — Esperante ĝis nun aperis: I. en „Bohema esperantisto 1910“ (pĝ. 38, 72), II. en „Boh. esp. 1911“ (89, 145), VI. en „Boh. Esp. 1904“, IX. (fina) sekvas en tiu ĉi artikolo. La ceteraj aperos en „La Progreso“ kaj ĉiuj poste en libro.

Ni priparolis kelkajn etikajn sistemojn. Ili ne estas ĉiuj, sed tamen la ĉefaj el tiuj, kiuj celas novan, mi dirus modernan, moralon. Ili ne estas ĉiuj,

sed el la prezentita superrigardo oni povas vidi, ke la nuntempa pensado havas tre fortan etikan tendencon. Certe ne estas pravaj tiuj, kiuj kondamnos nian tempon pro neidealismo. Mi ne volas laŭdi nian tempon, sed en tiu ĉi rilato mi ne volus esti maljusta al ĝi.

En la fino, por ke ĉio ne estu sola kritiko, mi volas nun fari interkonsenton pri la aferoj, kiuj por ĉiu el ni devas esti kaj estas gravaj.

Antaŭ ĉio pri la diferenco inter la religio kaj la moralo. Inter la religio kaj la moralo estas diferenco objekta. La moralo ne estas religio kaj la religio ne estas moralo. Povas esti homo religie tre kredanta, tre sindona, al sia eklezio, al siaj dogmoj kaj reguloj, kaj tamen li ne estas morala, li estas ja eĉ senmorala. Mi ne parolas sole pri la bigoteco. Sed ekzistas tiom da diversaj formoj de la religio, ke simple rigardi homon kun religio kvaŭzaŭ homon kun moralo, estas eraro. La moralo, tio estas la rilato de homo al homo. Ni bezonas la moralon en niaj rilatoj kun la proksimulo. La religio devenas el la rilato de la homo al la tuta mondo, precipe al la dio. La religio havas pli grandan sferon ol la moralo; en la religio la moralo estas entenata.

La religio devas esti bazo por la moralo. Mi ne povas imagi la lastan solvon eĉ de la morala problemo sen la religio. Sed por mi ne sufiĉas religio pozitiva, tio estas tiu de la nun ekzistantaj eklezioj. Mi deziras la moralon sur religia bazo, sed sur la religio alia ol la oficiale prezentata. Kia, pri tio oni ne povas ĉi tie paroli. Sole tion mi ankoraŭ dirus, ke oni ne devas identigi la religion kun teorio, kun eklezia doktrino. Sekve ni diferencigas la etikon religian kaj tiun teologian kaj eklezian.

Ĉe la problemo pri la moralo kaj ĝiaj fundamentoj estas unu grava, kvankam ŝajne formala, demando: Kiel ni konatiĝas al ni la lastajn verojn de la moralo? Kio devas decidi pri mia moralo? Pli precize dirite: ĉu mi povas starigi la principojn de moralo el miaj racio aŭ sento?

El la racio deveniĝis la fundamentojn de moralo preskaŭ ĉiuj malpli novaj

filozofoj de la pasinta jarcento. Racionalismo, racia filozofio, tio estis karaktero de la tuta dekoka jarcento. Tiam estis modo alvoki en ĉio la racion. Hodiaŭ kiel en la teorio tiel en la praktiko oni amas alvoki la senton. Post la tempo de la racionalismo venis tempo de la sento.

Signifa nomo por la tempo de la racionalismo kaj por la etiko fondita sur la racio estas Kant. La pura racio donas al la homo kategorian imperatigon, enmaskitan, internan konscion pri tio, kio devas esti; laŭ Kant tiu ĉi imperativo estas sankciita de la racio.

Sed kontraŭ tion diras aliaj, mi citas sole Hume: ne sur la racio, sed sur la sento, nome sur la simpatio, sur la humaneco, sur la amo estas fondita la moralo. Ami sin reciproke — tio estas kodo de ĉiu moralo. Fari pruvon pri tiu ĉi ordo ne estas necese, la sento mem ĝin donas al ĉiu.

En tio mi kliniĝas al tiuj, kiuj fondas la moralon sur la sento, sed mi ne kredas, ke la sento devas esti kontraŭstaranta al la racio. Ekzistas multe da sentoj: belaj, malbelaj, noblaj, malnoblaj, maldelikataj, brutalaj — ĉio ĉi estas sentoj. La etiko de sento ne devas perdi sin en sentoj. Mi do pensas, ke la harmonio de la sento kun la racio, kaj ioma supereco de la sento estas por ni fundamento de la moralo.

Post tiu ĉi formala demando, kiamaniere ni venas al la fundamentoj de la moralo, ni klarigos al ni tiujn fundamentojn mem. El tio, kion ni aŭdis, ni elektos la plej bonan. Sed mi timas, ke ĉio ŝajnos memkomprenebla. Mi ĉiam rememoras Eulenspiegel, kiel li kunvokis tajlorojn, ĉar li devas diri al ili ion gravan. Ĉiuj kunvenis, kaj Eulenspiegel atentigis ilin, ke ili neniam forgesu fari nodon. Simile okazas al tiu, kiu analizinte la filozofiajn kaj etikajn sistemojn devas prezenti sian decidon.

Antaŭ ĉio nenio nova, sed la malnova, ĝenerale akceptita regulo estas ankaŭ bazo eĉ de la moderna moralo: „Amu vian proksimulon kiel vin mem!”

Kiu estas proksimulo? Ni parolas pri la idealo de la humaneco; mi akceptas tiun ĉi idealon. Ĝi havas por ni du sencojn. Unue: la idealo de la homeco,

esti homo. Due: rilato al la homaro en la plej larĝa amplekso, homareco.

Sed la humaneco kiel amo al la homaro en la plej larĝa amplekso facile fariĝas abstrakta, fariĝas amo en la fantazio, ne en la realo. La amo devas esti koncentriginta. Ami ĉiujn egale estas neeble. Ni elektas kaj ni devas elekti objektojn de nia amo. Ni devas havi certan celon.

Kaj tial la proksimulo, se nia amo al li devas esti praktika, efika, estas por ni homo la plej proksima. Kaj la homo plej proksima al ĉiu estas la patrino, patro, frato, fratino, edzino, infanoj. Ni havas ĝis nun neniun scion, kio estas farebla en tiu ĉi rondo, pri kiu ni kredas, ke ni ĝin amas. Sed mi petas, observu vin mem kaj la aliajn, kia estas nia rilato al la plej proksimaj personoj, kaj ni estos ofte konsternitaj, kiel malmulte ni konas ilin kaj kiel malmulte ni amas ilin en la realo. Almenaŭ oni ne povas diri, ke ni amas tion, kion ni tiel malmulte konas. La plej proksimaj el la proksimuloj por ni ĉiuj estas la infanoj. Jam antaŭlonge estis dirite: „Estimu viajn patron kaj patri-non!“ Mi opinias, ke ni devas aldoni: Kaj respektu la animon de via infano! Memoru venontajn generaciojn! Nia amo estu do reciproka, sed oni ne ligu nin en la reciprokeco.

Proksimulo de la viro estas virino, al la virino la viro. Tiun ĉi plej intiman rilaton, devas plej efike sanktigi la vera amo. La virino tute egalrajta kun la viro, sole fizika diferenco estu rekonata: ŝi estas malpli forta.

Se la idealo de la humaneco, rilatanta al la tuta homaro, estas iom nepreciza, ĉu ĝi fariĝas pli preciza per tio, ke ĝi enhavas ankaŭ la nacion? Ĉu ankaŭ la nacieco ne estas ĝis nun nepreciza kaj ĝenerala ideo? Malpli ol la ideo pri la homaro, sed por la plimulto de homoj ankaŭ la ideo pri la nacio fariĝas malpreciza same kiel por tiuj, kiuj celas la homaron. Kiom oni mensogas kiel en la nomo de la nacio tiel en la nomo de la homaro!

La amo, la humaneco devas esti pozitiva. Ofte la malamo, ekzemple al alia nacio, estas jam rigardata kiel la amo al sia nacio. Pli alte estas ne malami, sed pozitive ami. Mi ne diskutos pri tio,

ĉu oni povas ami ion fremdan tiel kiel sian, Ekzemple ami fremdan nacion kiel la sian. Estus kontraŭnature tion postuli; sed ni kutimiĝu niajn nacion, familion, partion, kiun ajn ami pozitive, tio estas sen fono de la malamo, kaj tiam tute nova morala mondo malfermiĝos antaŭ ni. (Daŭrigo.)

PRI LA ĈIUTAGA VIVO DE AFRIKA PLANTISTO.

(Letero el la Centra Afriko.)

Al tre multaj homoj Afriko estas nur lando de sovaĝaj bestoj kaj pli sovaĝaj viroj; certe ja estas tiel, sed estas multaj Eŭropanoj, kiuj trovas la vivrimedojn per vigla laborado eĉ tie ĉi. La plimulto de la blanka loĝantaro okupiĝas pri la kafo-plantado, kaj pri tia plantejo mi volas al vi skribi.

Antaŭ tri jaroj mi trovis, ke en Eŭropo estas multaj malfaciloj; tial mi forlasis la patrolandon kaj troviĝis en Tanganjiko. Ĝi estas bela lando, kaj ĝuas belan klimaton, ĉar ĝi estas ĝuste sude de la ekvatoro kaj proksime al la marbordo kaj la grandaj lagoj. Tie estas ja varmege. Mia hejmo estas sur la okcidenta flanko de la monto Kilimanĝaro, kie la vetero similas al tiu de suda Eŭropo. (Ne tro multe varme „somere“ kaj ne tro malvarme „vintre“). Sed super mia kapo mi povas vidi la nekovritan pinton de Kilimanĝaro, kie la veterkondiĉoj estas preskaŭ arktaj. Mia restadejo estas 1575 metrojn super la nivelo de la oceano, kaj ĝi estas ideala loko.

Mi havas ĉirkaŭ cent nigrajn laborantojn, kiuj malgraŭ la opinioj de kelkaj Eŭropaj skribistoj, estas tute feliĉaj, kaj ricevas sufiĉan salajron por la vivrimedoj kaj eĉ por la luksaĵetoj. Dum ili laboras ĉi tie, mi havigas al ili bonajn domegojn, kaj ĉiutagan manĝaĵon. — Krome, ĉiuj havas ĝardenojn, kie ili kreskiĝas fruktojn kaj legomojn. Sur ĉi-tiu bieno estas lernejo, kie la negroj, kiuj estas studemaj, lernas la legadon unue, kaj poste aliajn sciencojn. Kompreneble, la legado devas esti la unua tasko, kaj ne estas facile por la plenaĝuloj kompreni la signojn, al kiuj ili ne al kutimiĝis. Sed ili forte deziras iĝi kleraj, kaj ne povas esti venkataj de tiaj malfaciloj.

Kiam mi venis ĉi tien, ne ekzistis io, kio pensigis, ke iam estus bieno! Mi devis forhaki la arbetaĵon, por fari lokon por mia tendo,

kaj la tendo de miaj ses viroj, kiujn mi estis dunginta. Dum la nokto leonoj bojegis, rinoceroj kaj elefantoj bruege preterpasis kaj multaj aliaj nekonataj danĝeraj forrabis mian dormopovon! Iom post iom, per la helpo de miaj fortikaj amikoj, forta lokomobilo, kaj dudek virbovoj, la arbeto kaj la arbaro estas forigitaj de la koncerna loko, kaj ni jam plantis 40.000 kaf-arbojn. Sovagaj bestoj ne estas forigeblaj, sed ni jam „civilizis“ la lokon tiom, ke oni povas iri al la legomĝardeno sen pafililo.

Al ni la taglaboro ne estas seninteresa. Je la sesa horo matene sonorilo vokas la dormemajn virojn, kiuj iras al la taskoj kun laŭtaj oscendoj kaj plendoj pro — malvarmeco de tiu-ĉi lando. La Eŭropano post vidinte ĉiujn ĉe la donitaj taskoj, kutime devas preni la pafilon kaj iri serĉi ĉasaĵon por la viando-porcioj de la laborantoj. Ofte li serĉas vane, sed foje li pafas cervon aŭ zebbron, kaj tiukaze oni povas aŭdi la ĝojkriojn de la negroj, kiuj ne ŝatas labori sen „njama“ (viando). Sed ofte la ĉasisto trovas beston, kiu ne utilas por manĝaĵo. Unu taĝon mi mem renkontis ses leonojn sur senarba monteto kaj mi konstatis kun ĉagreno ke mi havas nur tri kartoĉojn! Tia ĉi renkontiĝo povas okazi ĉiutage. Post la matenmanĝo je la 8a horo oni devas direkti la farmlaboron ĝis la tagomezo. Eble ĉe la plej malproksima parto de la bieno funkcias lokomobilo, plugante novan landpecon; sendube la nigra „funkciigisto“ sukcesos difektigi almenaŭ ion inter la vizitoj de sia estro, kaj tiu devos ripari ĝin. Ĉe alia loko pene laboras longa vico de dudek bovoj, kiuj trenas pezan plugilon; ofte post unuhora laborado unu bovo kuŝiĝas, aŭ simple staras senmove tute surda je krioj, petegoj kaj batoj de l' plugisto kaj ties tri helpantoj; tiam kiam la viroj jam lacas pro vanaj penoj ĝi subite vekiĝas, kaj ektremas kun siaj kamaradoj kvazaŭ ĝi estus la plej laborema bovo en la mondo. Inter la longaj vicoj de kaf-arboj funkcias kulturiloj kun po du bovoj, por senherbaĉigi la plantejon, kaj konservi la malsekecon de la tero, ĉar la pluvo falas nur dum oktobro-novembro kaj de marto ĝis majo. Post la pluvado, la herbaĉoj estas tre fortikaj; tial viroj laboras ĉirkaŭ la arbetoj per sarkiloj, kaj dum ili laboras, ili kantadas! Mi preskaŭ skribus „kantaĉas“, sed tio nur montrus mian propran malbonan guston. Tielmaniere ili kutime sciigas min pri siaj deziroj: se dum kelka tempo mi ne sukcesis pafi ion, la „ĉefkantisto“ ekkantas tiel: „Dum multaj tagoj mi ne ricevis viandon“, kaj la aliaj sekvas per fortaj basaj voĉoj: „Ni ja

ne ricevis, ne manĝis viandon“. Ili daŭrigas la kanton ĝis ili vidas, ke mi estas kompreninta, tiam la ĉefo ekkantas: „Se nia mastro amus nin, li pafus zebbron por ni“... kaj la horo sekvas per: „Ho jes; li certe irus ĉasi“... Mi scias ke la kanto estas por mi, ĉar ili uzas la Suahilan lingvon, kiun mi komprenas; alie ili uzus la propran idiomon, kiun ili pensas, ke mi ne scias!

Tagmeze oni sonorigas, kaj ĉiuj iras hejmea por duhora ripozo kaj tagmanĝo. Posttagmeze la aliaj taskoj devas esti prizorgataj: La kafo-plantejo bezonas akvumadon ĉiutagan, kaj ni trovas ke la negroj, kies tasko estas prikulturilo la maizokampon forte emas dormi dum la suno varme brilas, se oni ne vekigus ilin.

Dum mi skribas, aro da elefantoj estas detruanta akvokanalon en la arbaro, kaj malgranda nigra knabo urĝe petas min iri forigi la bestegojn. Sed mi prefere atendos iomete. Estas pli facile ripari la kanalon, ol batali kun sovaĝaj elefantoj, kaj atentigi ke iu ne piedpremu min; ĉu ne?

La fruktaro estas ĉiam ĝojigaj por homo el norda lando, ĉar tie ĉi oni havas oranĝojn, citronojn, bananojn, kustard-pomojn, guavojn, mangojn kaj ĉiujn tiajn bonaĵojn, pri kiuj nordlandano nur songas. Ankaŭ la simioj kaj pavianoj ŝatas tiajn, kaj la ĝardisto ĉiam staras, por protekti la trezorojn de la plantejoj.

Pri tiaj taskoj oni okupas sin en tiu ĉi lando de ĉiama sunbrilo. Estas bona vivmaniero, ĉar oni povas iom forgesi la malfeliĉon, la malamon, la maljustecon, kiujn oni spertas en la kompatinda Eŭropo. Ne ĉiu povas ĝui la kvietan vivon de Centra Afriko. Sed kiam la maluma vespero venas, mi mem tiras la seĝon proksime al la fajro, kaj legas, aŭ skribas, aŭ studas, laŭ emo. Mi estas tute feliĉa for de la luktoj de lacaj, elĉerpitaj landoj, kaj amas ĉi tiun sanan landon kaj la bonan liberan vivon. Kaj kiam la malvarma vento ekblovas de super la neĝoj de nia monteĝo, aŭ kiam la varma vento blovas el la norda dezerto, mi estas kontenta. Ĉu mi ne havas bonan domon, ŝatatan laboron, konvenajn studojn!

Iam mi sciigos Vin pri la lingvoj, la loĝantoj blankaj kaj nigraj, se plaĉos al vi. Sed nun mi diros „Adiaŭ“.

Via

John Williamson,
UEA-delegito por Orienta Afriko,

Al L. K.-a noj.

K. S.

Viajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de mia 75-jara naskiĝtago mi ricevis kun konfuzo, emocio kaj profunda danko.

Permesu, ke mi respondu per simplaj „Esperantaj Pripensoj“.

Malaperas la homoj. La ideoj solaj meritas postvivi kaj sola ilia triumfo estas grava.

Th. CART.

ESPERANTAJ PRIPENSOJ

Tiuj, kiuj — dank' al nia propagando — lernas aŭ intencas lerni nian lingvon, tiuj, kiujn ni varbas, havas la rajton postuli de ni la garantion, ke nian lingvon oni ne ŝanĝos, kiel oni ne ŝanĝas la anglan, la francan, la germanan aŭ iun ajn alian instruotan lingvon. Honestaj propagandistoj, tiun certigon ni ŝuldas al ili, tial ke internacia lingvo ne estas por ili celo sed ilo, kiun ili tute prave deziras uzi kaj utiligi.

La angla, la franca, la germana lingvoj, kiel ĉiuj vivantaj, t. e. uzataj lingvoj, evoluas senrompe. Same Esperanto, vivanta, uzata lingvo, senrompe evoluas kaj evoluos, kvankam praktike la sama morgaŭ kiel hodiaŭ, la sama en Anglujo kiel en Francujo, en Germanujo kaj en ceteraj landoj.

Internacia lingvo, kontrakto inter la uzantoj, estas sekve multe pli socia ol pure lingva problemo. La perfekteco ĉi tie kuŝas ne en enkonduko de pli malpli dubaj plibonigoj, ĉiam diskutebaj, sed en la plena unueco de la samlingvanoj, de la adeptoj.

Konservativuloj ni do estas, ĉar homoj progresemaj, kiuj, konstatainte la plenan taŭgecon de la ilo, volas ĝin konservi, ĝin vivigi per tuja uzado kaj — ne perdante sian tempon, siajn fortojn en vana, frivola, senfrukta, senfina serĉado — senlace propagandas ĝian uzon por grava, socia, internacia rolo, kiun ĝi celas.

Cion tion ĉi, eble pli instinkte ol konscie, komprenis la disĉiploj de Zamenhof. Per sia disciplino ili certigas kaj certigos la finan sukceson.

Ĉi tiuj ideoj gvidis de la komenco mian agadon sur la kampo de internacia lingvo kaj ĉiam pli klare, ĉiam pli energie ili sin altrudis al mia spirito, mi aldonos al mia koro, al mia esperantista konscienco. Ilin mi fidele defendis ne kiel miajn, sed kiel nepre devenantajn de l' koncepto, de l' penso de nia Majstro, kiu celis antaŭ ĉio la homaran bonon per komuna lingva ligilo.

Esperanto estas vere io tute alia ol interesa ludilo por eĉ tre kleraj lingvamantaj dilettantoj. Ilian riproĉon pri „fanatika, blinda konservatismo“ ni povas akcepti kun supera, trankvila indiferenteco. Nin ĝi ne atingas.

Ni firme iru nian rektan vojon!

Th. CART.

Parizo, la 31. de Marto 1930, je la 75-jara datreveno de mia naskiĝtago.

...Kelkaj al ni riproĉis, ke ni faras literaturon en Esperanto, aliaj, ke ni literaturon ne havas. Unu la alian detruas tiaj kritikoj. Kiel estus eble, ke lingvo vivu sen literaturo? Al vivanta lingvo ĝi estas ja necesa kiel la koro al vivanta homo. Literaturo estas por ĉiu lingvo la beliga centro, en kiun alfluas la sango por puriĝi kaj poste refluvi en ĉiujn partojn de l' vivanta korpo. Lingvo ne povas esti laŭordone nur komerca kaj scienca.

Kiel povus iu malpermesi, ke troviĝos iuj homoj por paroli pli arte kaj pli zorge ol aliaj? En ĉiu homo kaŝiĝas iu deziro al beleco. de ŝtono la homoj provis skulptadi figuraĵojn Jam en prahistoriaj epokoj per pintaj pecoj sur la maldikajn meblojn, kiujn ili tranĉadis por si el la trunko de l' falintaj arboj. De belarto tio estis la humila komenco.

Ankaŭ en parolo baldaŭ troviĝis artistoj, kiuj deziris kanti ritmitajn frazojn aŭ diri rakonton en ia pli bela maniero, ol kutime. Kiel estus eble malpermesi, ke talenta homo skribu aŭ parolu en pli eleganta maniero, ol lia najbaro, kiu uzas la lingvon nur por vendadi aŭ ordonadi per mallongaj rapidaj frazetoj? Kiel oni povus malpermesi, ke ni, Esperantistoj, ŝatu kanti kune laŭ vortoj amataj?

Ja ĉio estas literaturo, kaj ĉio ĉi okazas en plej natura maniero.

(El la parolado ĉe la Antverpena Kongreso 1911.)

...Kio estas lingvo? Ĉu ĝi kuŝas en la gramatikoj kaj vortaroj? Ne, tute ne, tie kuŝas nur skeletaj rimarkoj pri ĝi, Ne en la libroj troviĝas la lingvo, sed ĉie, kie ĝi skribiĝas kaj paroliĝas. Tie ĉi estas la lingvo, dum ni parolas, hodiaŭ matene dum ni diskutadis, hieraŭ vespere en la deklamado, ĉiutage en niaj konversacioj, en niaj leteroj, en niaj gazetoj; ĉie, kie sonas Esperanto, ĉie, kie flugas esperantaj frazoj, ĉu de lipoj al oreloj, ĉu de plumo al okuloj, tie estas nia lingvo, kaj tie ĝi vivas. La lingvo estas ĉie, kie ĝi estas uzata.

(El la parolado de Edm. Privat ĉe la Antverpena kongreso 1911.)

Literatura Mondo, literární a umělecká revue, začne znovu vycházeti v lednu. Jednotlivá čísla 6 Kč (ročně 60 Kč). Přihlaste se k odebírání (platit možno po každém čísle) u adm. t. l. Očekává se též přispívání čs. esperantistů.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

NUMERO 31.

NOVEMBRO 1930.

IV. KOMITATA KUNVENO

la 12. Novembro 1930, en kafejo Louvre, Praha II. Národní 20.

Ĉeestantoj: S-roj: Brambora, Ginz, Hromada, Janda, Dr. Pitlík, Slavík, kaj Sustr.

Senkulpigis sin ges-roj: Fousek, Grauerová, Herzigová, Sklenčka, Kamaryt, Tarantíková, Zemek.

Protokolas s-o Ginz, ĉar la protokolistino ne ĉeestas.

Malfermo: 20.30 horo.

1. Esperanto en lernejoj:

Dro Kamaryt informas skribe: Nia petskribo pri la Interŝtata akordo estis sendita al la ministerio de instruado, laŭ interkonsento kun ICK la 30an de oktobro 1930. La kopion de la petskribo kun projekto de la akordo ni sendis al taŭgaj adresoj kaj al ministroj Déer kaj Beneš kun klarigaj leteroj. Pri la petskribo mi informis GEL, kiu promesis sendi la saman peton. Rezoluciojn subtenantajn nian paŝon sendis laŭ nia iniciato ĝis nun jenaj kluboj: (en laŭtempa sinsekvo) Přerov, Pardubice, Spišské Vlasy, Vyškov, Břeclav, Bratislava, (Klubo, Juda Grupo), Praha, Kutná Hora, Prostějov, Brno, Pezinok, Kolín, Hradec Král., Holice u Olomouce, Kladno, Nymburk, Bystřice pod Hostýnem, Trnava, Kopřivnice, Karvinná, Olomouc, Nové Zámky, Frýdek, H. Jindřichovice u Rumburku, sume 25 kluboj. (Frýdek enpresigis la rezolucion en la gazeto Nový Směr, Prostějov en la multobligita „Ligilo“). Ni dankas al ili sincere kaj petas, ke ankaŭ la ceteraj kluboj ne prokrastu sendon de la rezolucio aŭ informu nin pri la sendo. Ĝis nun tiel ne faris 23 kluboj, kiujn ni petis pri tio.

2. Elektaj en ICK.

Nia ĝenerala sekretario s-o Hromada estis nomita laŭ la letero el 25. X. Konsilanto de ICK. Kun aprobo estis aŭskultita la dankesprimo al s-o Hromada por lia okjara laboro. Plena teksto estos represita en la Bulteno.

3. Propaganda fremdlanden.

Ni sendis laŭ iniciato de ICK al ĉefo de la registaro kaj al Porfremdula asocio en Vaduz (Liechtenstein) oficialajn eldonaĵojn de nia fervoja ministro (12 il. poŝtkartoj kaj Krkonoŝe) kun gratulo por eldono de oficialaj poŝtkartoj kun teksto en Esperanto.

4. Leteroj.

Ni gratulis direktoron Krumpholtz okaze de lia 60a naskiĝtago. Ni kondolencis al fervoja konsilanto Friedrich en Košice pro morto de lia edzino.

5. Teksto pri ĈAE en UEA jarlibro.

Ĝenerala sekretario korektis la tekston laŭ nuna stato, kaj sendis al Ĝenevo.

6. Varbado.

Estas legita informo de kasisto s-o Sklenčka pri la dankindaj rezultoj de lia ĝisnuna varba laboro. Depost la Januaro 1930 ĝis 9 Novembro pagis.

4 personoj por la jaro 1928,
48 personoj por la jaro 1929,
117 personoj por la jaro 1930,
16 personoj por la jaro 1931.

7. Vizito de Hindo Sinha.

Sro Csáder Bratislava, skribas pri la ebleco inviti la hindan samideanon Lakmishwar Sinha, nun vojaĝantan en

nordeŭropaj landoj, al propaganda vojaĝo tra nia respubliko. Estas nova atentigo pri la planata jam ideo. Ni skribos nun al Sinha pri kondiĉoj, kaj petas ĉiujn klubojn, ke ili nin baldaŭ informu, ĉu ili havas intereson pri tiu vizito en ilia urbo.

8. Esperantaj eldonaĵoj de la Fervoja ministerio:

Post apero de la sciigo en Heroldo de Esperanto pri eldono de la p. kartoj kun esperanta teksto, la ministerio ricevis kelkajn centojn da mendoj. Nun la provizo jam preskaŭ elĉerpiĝis kaj tial la ministerio sendos al ĉiu petinto sole po unu poŝtkarto kun surprisita klarigo pri nesendo de la tuta serio. ĈAE sendos el la ricevita kvanto 20 seriojn al s-o Sklenĉka por transdono al CO de UEA. Laŭ informo de Dro Pitlík, la fervoja ministerio eldonos en proksima tempo gvidlibron esperantan pri la montaro Tatry. La ministerio decidis post la konstatita sukcesoj aperi ĉiujn siajn eldonaĵojn destinitajn por eksterlando deponi nun ankaŭ en Esperanto.

9. Mondvojaĝo de ICK delegito Scherer..

Ni invitis per ICK s-on Scherer al nia ŝtato. Kluboj kiuj deziras havi sinjoron Scherer en sia loko informu nin. Li venus al ĈSR en printempo 1931.

10. Esperanto-marŝo de sinjoro Mádle Terezin.

Oni resendas al s-ro Mádle kun danko la muzikaĵon proponitan por eldono. Li estos atentigita pri la eldono Hirt Leipzig kaj Brita Esperanto-Asocio.

11. Biske.

Esperanto-Amikaro Praha petas, ke ĈAE en nomo de ĉiuj esperantaj organizaĵoj Ĉeĥoslovakaj sendu al la ĉeĥoslovakaj gazetoj informon, ke ili neniam havis ion komunan kun sinjorino Biske, nun pro diversaj akuzoj malliberigita. Ĝenerala sekretario s-ro Hromada atentigas, ke li tuj post apero de unuaj artikoloj pri s-ino Biske en

la gazetoj, sendis al redakcioj de ĉiutagaĵaj gazetoj en Praha sciigon en tiu senco. Ĝi estas trovebla ankaŭ sur la 62a paĝo de La Progreso. Vicprezidanto dro Pitlík sciigas, ke li la samon deklaris al red. de Polední List, estinte tien vokita.

12. Rilato kun oficialaj lokoj Ĉeĥoslovakaj.

Laŭ propono de dro Pitlík ĈAE skribos al ŝtataj oficoj kaj al gravaj institucioj kaj aŭtoritatoj, kaj proponos liveradon de informoj en ĉiuj aferoj koncernantaj esperanton. Dro Pitlík donos la adresojn, al kiuj la leteroj estas skribotaj.

13. Kunveno kun GEL.

La korespondado kun GEL pri tiu kunveno restis ĝis nun senrezulta. GEL donis sian respondon malfrue, (en junio post la tagoj proponitaj por kunveno). Ni petos nun denove GEL, ke ĝi mem nomu al ni datojn por ĝi konvenajn, por ke povu esti farita rapide interkonsento pri la kunveno.

14. Esperanta parolfilmo.

La parolanta esperanta filmo de Paramount estis prezentita al kelkaj komitatanoj de ĈAE de Paramount-filio en Praha. Laŭ peto de ĈAE, tiu-ĉi proksimume 6minuta filmo, prezentanta interparoladon inter usona kaj belga esperantistoj estas envicigita deponi la 21. Novembro en la „ĵurnalon“ de la kinoteatroj Alfa kaj Fenix en Praha.

15. Esperanto kaj radio.

Dro Pitlík transdonis jam manuskripton de sia parolado „Esperanto en servo de parolanta filmo“ al Radio-journal. De tie estas nun necese atendi informon.

16. Membra kunveno de ĈAE en Praha,

estas kunvokita por la 28a de nov. en la novan ejon de la Esperantista Klubo en Praha, (Kafejo Louvre.)—

17. Zamenhofa radiovespero 15. XII.

Radiojournal estos petita pri disaŭdigo de esperanta programo proksimume duonhora, okaze de la mortotago de Zamenhof.

18. Antaŭkongresa vojaĝo tra Ĉeĥoslovakio al Krakovo.

Dro Pitlík petis ĈEDOKon, ke ĝi liveru komparon de veturkostoj al Krakovo tra nia lando kaj ekster ĝi, por ke ni povu informi al la kongresanoj de la XXIIIa pri la avantaĝoj de nialanda vizito. Ni skribos ankaŭ el Krakovo pri niaj preparoj antaŭkongresaj. Fervojan ministerion ni petos pri rabato. Petskribon preparos dro Pitlík.

19. Gvidlibro pri Praha.

Estos faritaj preparaj laboroj por eldono de tiu gvidfolio por kiu Postkongresa Komitato 1929 en Praha decidis 2000 Kč. Kvanto de la gvidlibroj estos uzita por la propagando en Krakovo.

20. Gazetara sekcio.

S-ro Ginz anoncas eldonon de nova cirkulero, kiu pro troa okupo de sro Slavík ne povos esti multobligita kaj ekspedita pli frue ol la 24 Novembro.

21. Japana samideano,

kiu laŭ informo de sro Ŝustr intencas viziti Ĉeĥoslovakion, ricevos laŭ propono de sro Ŝustr invitan leteron de ĈAE, kiun li bezonos por japana pasporta oficejo.

22. Gazetaj eltranĉaĵoj.

Parto aranĝita de s-ino Herzigová estas nun ĉe sinjoro Ŝustr kiu promesis aranĝi la tutan nunan provizon. Li ricevos tial ĉion ĝis nun kolektitan.

23. Dana filmo.

Tutvespera filmo pri Danlando kun esperantaj tekstoj, kiun disponigos la dana registaro por eksterlanda propagando, estis mendita de ĈAE. Detaloj ankoraŭ mankas, sed ĈAE petas rapidan informon de kluboj, kiuj volas

aranĝi la prezentadon de la filmo en ilia urbo. Ceteraj aferoj estas pro malfrua horo prokrastitaj por la venonta kunveno. Fermo je la 23.45 horo. Protokolis O. Ginz.

**S-RO RUDOLF HROMADA, LK. PRAHA,
ELEKTITA KONSILANTO DE ICK.**

La direktoro de ICK informis nin laŭjane: „Kun la 22-a Universala Kongreso en Oxfordo finiĝis la membreco de S-ro Rudolf Hromada, LK-ano kaj ĝenerala sekretario de la ĉeĥoslovaka Asocio esperantista, kiel membro de ICK. Por manifesti videble sian koran kaj profundan rekonon pro la multaj servoj, kiujn S-ro Hromada faris al nia movado kaj precipe en ICK dum la okjara membreco, la membroj de ICK unuanime decidis nomi S-ron Rudolf Hromada konsilanto de la ICK. La ICK esprimas samtempe la esperon, ke dum ankoraŭ multaj jaroj nia movado povos profiti el la sperta kaj malegoisma kunagado de nia ŝatata ĉeĥoslovaka samideano“.

MORAVIAJ PIONIROJ DANKAS

La eldonintoj de la Internaciaj Konvencioj pri fervojaj trafikoj kaj la tradukinto de la verko dissendinte senpage 150 ekzemplerojn al diversaj eminentuloj de nia movado kaj al ĉiuj asessoroj de I. A. E. F. ricevis tiom da dankesprimoj, ke ili ne kapablas danki al ĉiu skribinto aparte, tial ili esprimas sian sinceran dankon publike al ĉiuj, kiuj bonvolis afable akcepti la verkon kaj esprimis sian opinion pri ĝi. Precipe ni mencias s-rojn John Merchant, prezidanton de I. C. K., Eduard Stetler, prezidanton de U. E. A., dron Dietterle, direktoron de la E. I. en Leipzig, Th. Cart, prezidanto de E. A., Rollet del' Isle, E. Grosjean-Maupin kaj C. Rousseau en Paris, dron Liebeck en Berlin, kiu promesis pritrakti la verkon en la revuo: „Juristische Wochenschrift“, P. Christaller en Stuttgart kaj W. L. Waterman en Mile End en Suda Aŭstralio, kiuj tra leginte la tutan tradukon donis tre valorajn instigojn al diversaj plibonigoj, fine Hugo Salokannel en Selminen — Finnlando, Paŭlo Balkanyi en Budapeŝto kaj Esperanto Presse Dienst en Berlin, kiuj diskonigis la tradukon en siaj naciaj lingvoj.

Ankaŭ al ĉiuj ceteraj skribintoj nian sinceran dankon!

La eldonintoj: La tradukinto:
J. Mastaj. Josef Rebiček
Kudela.

ĈESKÝ TISK A ESPERANTO. — ĈEĤA GAZETARO KAJ ESPERANTO.

ESPERANTO-RUBRIKO EN NÁRODNÍ
POLITIKA

En tiun ĉi versimile la plej disvastigitan ĵurnalon ĉeĥoslovakano sukcesis nia neniam laciĝita kunlaborantino J. Šupichová enmetigi ĉiusemajnan rubrikon titolitan „Z esperantskĥe ŝvĥta“ (El la esperanta mondo). La unuan fojon aperis la rubriko la 25. III. 1929 kaj de tiu tempo ĝi regule aperas, preskaŭ ĉiun semajnon, ĝis fino de jaro 1930 ĝi aperis preskaŭ 80 foje. Sed ne sole la daŭreco kaj reguleco de la aperado meritas atenton, ankaŭ la enhavo de la rubriko mem. Fr-ino Šupichová verkas ĝin sola kaj informas per ĝi la leganton klare kaj koncize pri ĉio, kio okazas en nia movado. Ĉiu rubriko estas tre enhavoriĉa kaj ĉar la verkintino legas tre atente kaj zorge multajn esperantistajn gazetojn, ankaŭ esperantisto eĉ bone informata pri movado, trovos novaĵojn por si. Por montri ankaŭ al tiuj niaj legantoj kiuj ne legas N. P. la abundecon kaj trafekon de tiuj informoj ni reprenis dufoje la rubrikon de samideanino Šupichová sur paĝo 87 de la XI. jarkolekto kaj sur p. 10. de tiujara kolekto.

Zájmy ĉsl. poŝtovního a telegrafního zřizectva, Praha, které již loni přinášely mnoho zpráv, převzatých z odborného tisku esperantského, uveřejňují od června t. r. kurs esperanta, řízením p. taj. Votrubce.

Slovák, Bratislava přináší pravidelný esperantský kútík za hlavního spolupracovníci A. Macka, nyní v Dijonu.

Ruch, Brno, má téměř v každém sobotním čísle část sloupce, věnovaného esp. textu. Hlavní přispívateľ Jaroslav Hladký Michálkovice, nyní Karvinná.

Mladý Svět, časopis pro mládež, vydávaný státním nakladatelstvím, má rubriku Esperantem do světa, řízenou učitelkou Julií Šupichovou.

„**List Říšského svazu ĉsl. učitelek**“ uveřejňuje každý měsíc pravidelně obsáhlou rubriku o esperantu. Píše J. Šupichová.

Rozkvět, obrázkový list, Praha, uveřejnil v řadě svých čísel týdenní programy esperantského vysílání z různých evropských stanic. Rubriku tu zavedl a obstarával Otto Ginz.

Malý Čtenář, Praha, který v letech 1913-1925 na obálce uveřejňoval kurs esperanta (řídila J. Šupichová), obnovil rubriku esperanta s kursem letos. Vede říd. učitel A. Neužil z Olomouce.

Národní Politika v Praze uveřejnila dne 20. VII. 1930 dlouhý článek od E. J. Š.: Světová manifestace esperantistů.

Lidové Listy z 26. VIII. 1930 článek od Fr. Kudrny o XV. sjezdu mez. katolických esp.

Pražská zahradní bursa má dne 28. VIII. 1930 dlouhý článek „Učte se esperantu“, podepsaný Delegito de UEA.

Právo Lidu dne 1. XI. 1930 ve zprávě návrhové komise, přednesené posl. Píkem v plenu sjezdu strany soc. demokratické dne 29. IX.:

„Návrh dělnického svazu esperantského v Praze, aby do programu strany byl přijat pomocný mezinárodní jazyk se odkazuje výkonnému výboru k jednání s Internacionálou.“

Bratrstvo Praha v čísle 2. článek: My se do esperanta nepustíme?

Nový Směr, Frýdek, od svého 3. čísla obsahuje zprávy o esperantu, z esp.-a přeložené, nebo přímo v esperantu (o veletrhu lípském).

Naše Snahy, Brno, v čísle ze 27. X. 1930 mají obsáhlý článek pí M. Jelínkové: Proč jsem naprosto zastánkyní esperanta.

Pravda, Vídeň, dlouhý referát o esp. výstavě, pořádané esperantisty Ĉs. Orla ve Vídni (autor A. Vařejka).

Zájmy pošt a telegr. zřizectva, en Praha alportas en sia kultura rubriko informon pri esperanta parolanta filmo, kaj pri la intervjuo de S-ro Scherer ĉe Carl Laemle. Verkis resp. tradukis O. Ginz.

Časopis ĉsl. turistů Praha raportas pri la broŝuro Neue Wege für die Verkehrswerbung (S. K.).

Přítomnost, nezávislý týdeník, Praha, obsahuje ve svém 25. čísle (ze dne 25. června 1930) dvoustránkový článek Jos. Kosiny: Moderní člověk a esperanto.

Sbratření, monata gazeto por renovigo de la spirito kaj socio, redaktata de Přemysl Pitter en Praha X, Čelakovského 7, (jare 18 Kč) enhavas preskaŭ en ĉiu numero informojn pri esperanto kaj instigajn alvokojn al lernado.

La monata gazeto por studentoj **Studentský časopis** enhavas en la rubriko de la leteroj titolita „El la vivo de studentoj“ diskuton pri esperanto tute spontanee komencitan de la legantoj. (En unuaj numeroj de la jarkolekto 1930-31.)

En *Národní Noviny*, Brno, samideanino A. Holancová publikigas tradukon de la artikolo: Antaŭ la kongreso de virinoj en Azio. (25. 5. 1930.)

En *Národní Noviny*, Brno, aperis la 8. VI. 1930 ĉefa traduko de la artikolo pri la jubileo de la pola poeto Jan Kochanowski. El Pola Esperantisto tradukis A. Holancová en Vyškov.

Masarykův Lid, Praha publikigas la 26. 9. 1930 kiel felietonon la artikolon de Olafur P. Kristjánsson „Mil jaroj de la Islanda parlamento. El Heroldo de Esperanto tradukis V. Echter Praha.

Jarost, Božkov u Plzně, publikigas la 25. 9. 1930 artikolon Esperanto kaj sporto de Hans Gastgeb, sekr. de la II. Laborista Olimpiado (tradukis Jos. Pešek).

Sestavili jsme k informaci našich čtenářů tento přehled. Obsahuje v první řadě časopisy, jež přinášejí stále rubriky o esperantu, dále časopisy, jež uveřejnily delší článek o esperantu a konečně časopisy, které měly články převzaté z esperanta.

Nepochybujeme o tom, že mnohého pesimistu tento přehled příjemně překvapí. Ti naši přátelé, kteří se o to zasloužili, mají náš upřímný dík.

Nepochybujeme však zároveň o tom, že naše informace nejsou úplné. Máme je z největší části z Výstřižkové kanceláře, přímou informaci dostali jsme jen v málo případech. Upozornujeme proto na vyzvání uveřejněném na jiném místě tohoto čísla a prosíme, abyste laskavě působili k tomu, aby tato rubrika našeho Bulletinu mohla být stále a vždy hojně zásobena.

Kromě zpráv zde uvedených dodává nám Výstřižková kancelář i naši spolupracovníci v Tiskovém odboru Svazu množství menších notic o pokrocích esperanta, vzatých buď z cirkulářů Tiskového odboru, nebo z Progresu, nebo sepsaných samostatně jednotlivými samideány. Uveřejnění každý takový případ jest nám nemožno pro nedostatek místa. Výstřižky ty jsou však pečlivě tříděny a uschovávány a na konec roku bude nám snad možno podati spolehlivou statistiku o tom, jak si československý tisk všimá esperanta a problému jazyka mezinárodního vůbec.

R. H.

TURISMA PROPAGANDO.

Pri la germana broŝuro *Neue Wege für die Verkehrswerbung* informanta pri esperantlingvaj turismaj propagandiloj kaj pri la turisma servo de UEA raportas *Časopis turistů* (Turista gazeto) en 4-a numero el jaro 1930.

MEMBROJN DE LA ASOCIO

nepagintajn kotizon ankoraŭ por la jaro 1930 ni petas afable, ke ili bonvolu sendi la 16 Kč, por ke ni venu al fiksa nombro de la membroj. Ne prokrastu la menseendon! Nia n-ro ĉe la Poŝtĉeka oficejo estas 9.602 Praha.

ESPERANTO-GAZETOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO.

Krom organo de GEL, Marto, aperas aŭ aperadis dum la lasta tempo ĉe ni ankoraŭ: *Territoria tribuno de UEA* — delegitaro en Ĉeĥoslovakujo. Aperas laŭbezone kaj estas kolekto de administraj kaj aliaj dokumentoj adresita al la delegitoj por plifaciligigi al ili la konservon kaj uzon de tiuj dokumentoj. La unua numero aperis 1. XI. 1925. Abonpaĝo por kvin numeroj estas 7.50 Kč. Eldonanto kaj redaktoro O. Skleněka en Hradec Králové 628-a. La 1. IX. 1930 aperis numero 9-10 (duobla) — *Esperantský svět*, ĉeflingva propaganda gazeto. De 1. X. 1928 ĝis 1. XII. 1929 aperis kvinfoje, kune sur 44 paĝoj kaj 38 paĝoj do ĉefa-es-pa vortareto, 11×16 cm, por 10 Kč. Ĉesis aperadi laŭ informo en la lasta numero. Eldoninto kaj redaktinto Ing. L. Berger en Poŝtejn. — *Kalejdoskop de vivo*, „Dumonata organo internacia de BES“. Jare 10 Kč. Unua numero aperis 1. I. 1929, la 4-a I. IV. 1929, pri plua aperado nenio estis anoncita. Suma amplekso 48 paĝoj, 12×15 cm. Eldonanto Ing. L. Berger en Poŝtejn. — *Ligilo*, ciklostilita organo de Esperantista klubo en Prostějov, redaktata de Fr. Heikenwälder. Unua kajero (n-ro 1-2) aperis en aŭgusto 1930, la 5-a numero en novembro t. j. Prezo de 6 numeroj 6 Kč. — *Informa Bulletin de la Esperantista klubo en Brno*, hektografata, redaktata de Ernst Sonnenfeld, ekaperis en jaro 1930, en septembro 3. n-ro. Por membroj de E. K. senpaĝe. — *La internacia informanto*, ciklostilita, redakt. R. Kolář en Brandýs n. L., 1-a n-ro aperis en januaro 1930 nune jam ne aperas plu. — *Ĉeĥoslovaka Esperanto-Preso* eldonata de dr. A. Ditlík komencis aperadi ciklostilita en januaro 1928 kaj ĉesis antaŭ fino de tiu jaro. S. K.

MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

ESPERANTO-GRUPOJ KAJ ĈIUJ NIAJ SAMIDEANAJ KUNLABORANTOJ!

Restos el Via oferema laboro sole la duona rezultato, se Vi ne zorgis, ke Viaj iniciatoj kaj Viaj sukcesoj eĉ duonsukcesoj restu enskribitaj en la preso. Kaj se Vi agis en Ĉeĥoslovakio,

ĝi devas esti enskribita en La Progreso.

Tial ni denove ripetas la peton, ke Vi pri ĉio, eĉ pri la bagatela entrepreno, informu nian oficialan organon. Viaj informoj estu kiom eble plej precizaj. Ekz. pri kurso informu ĉiam: Kie ĝi okazis, kiam komencis, kiam finis, kiom da partoprenantoj estis, kiu instruis, kiom ofte, ĉu oni pagis por la kurso k. t. Ĉion sendu senpere al nia redakcio en Praha VII., Sochařská 333. S. K.

STATAJ EKZAMENOJ.

Ĉe la ĉeĥoslovaka ekzamena komisiono por popolaj kaj civitanaj lernejoj en Bratislava faris 10. XI. 1930 specialan ekzamenon el esperanto kun eminenta sukceso s-ro lernejestro Czibur el Železník p. Revúca.

OFICIALA INSTRUADO 1929-30.

En Bratislava en ĉsl. Komerca akademio, 24 lernantoj, po 2 horoj semajne, instruis profesoro Vlad. Jukl.

En Telč en ĉsl. realgimnazio, 36 lernantoj, po 2 horoj semajne instruis prof Fr. Kasalý. En ambaŭ lernejoj kiel nedeviga fako.

RADIO-BRATISLAVA.

Prelegoj en esperanto okazis en sekvantaj tagoj kaj pri jenaj temoj.

La 24. VIII. kaj 22. IX. 1928. Temoj: Turisma propagando por slovakaj urboj. Parolis Herold Kesik.

22. VIII. 1929. Šiprompiĝo. (Poemo tradukita el la franca de E. Wanitsek.

8. XII. 1929. Pri ekspozicio de pentraĵoj kaj skulptaĵoj de la „Artista amikaro slovak“ (Umělecká Beseda Slovenská) okazanta samtempe en Bratislava.

9. I. 1930: Slovaka literaturo. Unua parto. Prelegis ĉiam E. Wanitsek.

ROTARY.

Chrudim. En la ĉiticia Rotary-klubo parolis en oktobro S-ro Václav Vojtěch, direktoro de Anglo-ĉeĥoslovanská banka pri esperanto. La 10. Novembro okazis tie debato pri esperanto, kiun partoprenis S-ro O. Sklenčka.

INTERNACIA RENDEVUO EN JIČÍN LA 13. JULIO 1930.

Estis dissenditaj en la lasta momento 525 invitiloj por kunveni iom da esperantistoj, kiuj honorigis la eksterlandajn gastojn atenditajn de s-ro Josef Vitek, delegato de UEA en Konecchlumí apud Jičín. Je la fiksita tago venis el la eksterlandanoj nur du Svedoj s-roj Henriksson kaj Persson el Malmö kaj el ĉsl. esperantistoj venis dudek personoj. Sabata vespero estis uzita por amika kunesto en hotela restoracio; ĝi pasis tro rapide en vere agrabla kaj utila habilado. Dimanĉan antaŭtagmezon oni uzis por kvazaŭa kunveno, dum kiu estis la gastoj el eksterlando instruitaj pri nialanda movado esperantista. Posttagmeza pluveŝto ne retenis la partoprenantojn, kiuj kuraĝe eniris la rokojn de Prachov. Kiel ni aŭdis, ĉiuj partoprenintoj estis kontentegaj kaj oni rekomendas aranĝi similajn kunvenetojn pli ofte. OBVS.

Praha. En la reala lernejo en strato Ječná profesoro Kl. Urban instruas esperanton en Studenta Rondeto esp. Partoprenas 30 studentoj. La instruado okazas laŭ la lernolibro de Šilha.

Praha. Esperantista Klubo kunvenas de 31. Oktobro en novaejo: Kafejo Louvre, Národní, 20. Dum ĉiu kunveno (vendrede je la 20. h.) raportoj, informoj, konversacio, debato.

Bratislava. Esperanto-Klubo luis propran klubojon en strato Vydrická, 16, kie okazas kunvenoj marde kaj vendrede vespere. Ĉeĥoslovaka-germanan kurson esp. por 16 p. gvidas profesoro Jukl. — Sam-oj Csáder kaj Kiss gvidas kursojn por ĉ. 50 hungaraj skoltroj, kies revuo „Tábortüz“ (Tendfajro) publikigas poresperantajn paĝojn.

Bratislava. Teovesperon kun dancado aranĝis Juda grupo esperantista la 16. II. 1930 je la 17. horo en kelo de la kafejo Ĉeĥoslovanský dom. Ĉeestis pli ol 50 p., kiuj bone sin amuzis.

Orlová. E. grupo EMO organizas konversaciajn kunvenojn ĉiun dimanĉon 1/2 10 ĝis 1/2 13 en hotelo Hvězda. Kurso por komencantoj de post 5. X. en knaba lernejo.

Prostějov. Klubo aranĝis 5. X. esperantan propagandan ekspozicion en Národní dům. Vizitis ĝin 150 personoj malgraŭ malbona vetero. -- Al koresponda vespero okazinta 22. IX. venis 53 poŝtkartoj. Kurso por 12 partoprenantoj nuntempe daŭras en la klubejo. En la realernejo instruas prof. Havráněk 40 studentojn. Klubaj kunvenoj ĉiun merkredon je la 20 horo en la klubejo.

Olomouc. Esperantista societo kunvenas ĉiun ĵaŭdon je la 20 horo en hôtelo Národní dům. Ĝi provizas la publikan legejon en la urbo per esperanto-gazetoj kaj la publikan bibliotekon per esperantaj libroj. — Moraviaj Esperanto-Pioniroj donacis al prezidanto de la respubliko ĉe okazo de lia 80-a naskiĝtago bele binditan kolekton de gravaj esperanto-verkoj.

Plzeň. Klubo kunvenas ĉiun sabaton je la 21-a horo en restoracio U nově pošty, Kramářovy sady 23, por konversacio de progresintoj kaj informado de la komencantoj. Estas senpage pruntataj kaj interŝanĝataj kajeroj de la „Benson school of Esperanto“. Ankaŭ al nemembroj kontraŭ 5 Kč — garantio. — Laborista asocio kunvenas en la laborista domo Peklo ĉiun merkredon je la 20 horo, „Kulturo“ ĉiun vendredon en restoracio „U prazdroje“ en Andělská str. 7., Klubo Škvřňany ĉiun lundon en restoracio „Na vršíčku“ je la 20 horo. La kluboj eldonis komune hektografitan ĉeflingvan flugfolion rekomendantan „Balogi por internacia lingvo“.

GVIDLIBRO PRI PLZEŇ.

Jus ni ricevis de la urbestro de la urbo Plzeň (germano: Pilsen, mondkonata pre siaj bierfabrikoj kaj pro la uzinoj de Skoda) luksan gvidlibron 50-paĝan kun multaj belaj ilustraĵoj. La libro enhavas tekstojn (artikolo kaj klarigo de la bildoj) en 7 lingvoj: ĉeĥa, serbokroata, pola, franca, angla, germana, kaj esperanta. La esperanta teksto estas lerte verkita. Ni gratulas al niaj Pilzenaj samideanoj pro ilia bela iniciato.

ALVOKO

AL SUBKARPATAJ ESPERANTISTOJ!

Samideanoj el Subkarpata Rusujo! Ni mal multe konas nin reciproke, ni eble ne estas multaj, sed tamen ni povus unuigiĝe puŝi esperantan aferon en Subkarpata Rusujo antaŭen. Ĉu ni ne povus kunveni en ia urbo subkarpata kaj interkonsiliĝi pri niaj aferoj, preparoli tion, kio

nin interesas, kaj iomete amuziĝi esperante, kio treege mankas al ni, kiuj ne havas okazon por esperanta konversacio, vivante disigite? Ĉiujn proponojn kaj opiniojn sendu al: Ant. Jančík, účetní fy Lanna, filiálka Užhorod, Švehlova ulice.

ADRESOJ ESTAS BEZONATAJ.

Ni dissendos en fino de tiu ĉi monato grandan nombron de varbiloj por membreco de nia Asocio. Tial ni tre petas ĉiujn samideanojn, ke ili nepre kaj baldaŭ sendu al ni nomaron de homoj emaj subteni nian movadon per pago de la asocia kotizo aŭ per abono de la Progreso. Ĉiu, kiu instruis en la kurso dum la lastaj du jaroj, bonvolu al ni sendi ĉiujn nomojn de la kursanoj kun iliaj adresoj, eĉ se ili ne restis en la kurso ĝis la fino. Certe estas inter ili homoj emaj kaj kapablaj pagi nian malgrandan kotizon, eĉ se ili ne povis aŭ ne volis finligni la lingvon. Sekretarioj de la lokaj grupoj kaj kluboj bonvolu nepre frarigardi la nomarojn de la membraro kaj kopii por ni ĉiujn anojn, kiuj estas enskribitaj dum la lastaj kvar jaroj. Eĉ tiujn, kiuj neniam venas en kunvenojn. Ricevante neatendatan dulingvan alvokon tamen verŝajne kelkaj el ili, certe ne multaj sed tamen kelkaj, rememoros pri nia afero kaj vekigos almenaŭ por doni signeton de la vivo. Nenion ni rajtas malatenti. La adresojn sendu al nia kasisto s-ro O. Skleněka en Hradec Králové 628-a.

RADIULOJ!

Stacio Warszawa elsendas lunde la 15. XII. je la 14.40 esperantan paroladon de S-ro Edw. Wiesenfeld pri Zamenhof. Ĉeĥoslovakaj radioaŭskultantoj estas petataj aŭskulti kaj skribi pri tio informon al Radjo Poskie Warszawa.

AL SAMIDEANOJ EN ORIENTO!

Oriento kaj Ĉeĥoslovakio estas nomo de gazeto lukse eldonata, kun belaj ilustraĵoj, kies 6--7 nro de la III. jarkolekto (en franca lingvo) enhavas sur p. 35--37 tekston en esperanto. La gazeton eldonas Societo por Ekonomiaj kaj Kulturaj rilatoj kun la Landoj ĉe Nigra Maro kaj en la Oriento, Praha-II. strato Revoluční, 19. Tiu societo intencas ekribati kun la esperantista inteligentularo en orientaj landoj: Turkujo, Persujo, Sirio, Siano, Jugoslavio, Bulgarujo, Rumanujo, Soverio, Hinuĵo, Egipto, Palestino. La gazeton povas samideanoj el la nomitaj landoj ricevi senpage laŭ ia supra adreso. Iniciatis S-ro R. Bloch.

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

Redaktas O. Ginz.

Příští esperantský kongres v Krakově.

Ústřední esperantský výbor v Ženevě přijal pozvání polských esperantistů, aby byl konán světový sjezd esperantský roku 1931 v jejich zemi. Ustanoven byl Krakov, kde jsou již dnes konány přípravy. Československá organizace esperantská zahájila nutné kroky, aby výpravy na kongres z jednotlivých zemí byly vedeny přes Prahu a náš stát. Rozšíří za tím účelem ve velkém množství informační tiskopisy o republice.

Velký úspěch esperantské knihy.

Esperantské dílo inženýra Aisberga, poučující přístupným způsobem o principech radia, bylo uznáno mezinárodní kritikou za nejlepší spis toho druhu. Esperantský originál našel snadno dokonalé překladaatele a vyšly jeho překlady do četných jazyků v Evropě i v Americe. Přípravována jsou vydání i v několika řečech asijských. Český vyšlo dílo již třikrát.

Esperanto na poštovních známkách.

Nově vydané ruské poštovní známky po 1 a 2 rublech mají esperantský text pod svými vyobrazeními. První známka má obraz telegrafní ústředny v Moskvě s textem: Centra telegrafo Moskva, na druhé známce je vyobrazení hydroelektrárny se slovy: Volhov HES je la nomo Lenin. Při vši úctě k ruskému jazyku máme za to, že tomuto esperantskému textu na známkách, určených hlavně pro korespondenci do ciziny, bude ve světě lépe rozuměno než nápisům v azbuce.

Esperantský zvukový film.

Velké americké filmové výrobny se přesvědčují, že angličtina není vhodným jazykem pro mluvicí film. Důkaz, že tato řeč jest považována za řeč světovou neprávem, se zdařil právě nejlépe zvukovým filmem. Anglické rozmluvy ve vychvalovaných 100procentních zvukových filmech u nás i v jiných zemích jen rušily a jsou nyní z velké části prostě vynechávány. Zůstal zpěv a k dosažení srozumitelnosti jsou vkládány podle starého způsobu psané titulky. —

Přední dvě filmové společnosti, Paramount a Universal Film Corporation zabývají se myšlenkou, přivést na světový trh mluvicí film esperantský. Zjistily, že obecnost ve většině zemí evropských velmi dobře rozumí mluvenému esperantskému slovu i bez učení. Další důležitá přednost jest naprostá neutralita esperanta, které nemůže narazit u žádného národa. Společnost Paramount vyrobila na zkoušku první krátký mluvený film esperantský, který bude v nejbližší době promítán i u nás v Československu.

Andreův deník v esperantu.

Švédské nakladatelství esperantské v Stockholmu vydalo koncem listopadu esperantský překlad Andréova deníku. Jest to dokonalý převod, určený pro informaci celé ciziny a pořízený Švédy podle rukopisu, jež rozluštil uppsalský profesor Svedberg. Objemný svazek přináší podrobnosti o osudech neohroženého badatele Andréa a jeho druhů, kteří v červenci r. 1897 vzlétli balonem na Svalbardu (Špicberkách) a jejichž další osud byl až do poslední doby neznám.

Liechtensteinsko zve k návštěvě své země.

Vláda knížectví Liechtensteinského vydává serií úředních korespondenčních lístků s krásně provedenými pohledy na tuto malebnou zemi s příslušnými texty. Jest zajímavou novinkou, že texty jsou německé a esperantské. Esperanta jest použito, aby obrácena byla pozornost turistů celého světa na tuto zem, jež její poloha mezi Švýcarskem a Rakouskem na důležité mezinárodní trati velmi usnadňuje návštěvu.

Organisovaná světová propaganda esperanta.

Ústřední esperantský výbor v Ženevě vyslal na cestu kolem světa svého delegáta, jehož hlavní úlohou bude informovat o otázce mezinárodního jazyka obyvatelstvo krajů, kde dosud nebylo organisované práce pro zavedení esperanta. Má též usnadnit systematickou činnost v jednotlivých zemích a umožnit jí i tam, kde dosud byli činní jen jednotlivci. Delegát Joseph R. Scherer vyplul ze St. Francisca na Havajské souostroví, odkud se odebral do Japonska. Na jaře roku 1931 jest očekáván v Evropě.



UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

SIDEJO: GENÈVE, SVISLANDO

Servaro: Bibliografia Servo — Eldona Servo — Ekspozicia Servo —
 Financa Servo — Gazetabona Servo — Informa Servo —
 Komerca Servo — Kongresa Servo — Libro-Servo — Re-
 klama Servo — Servo de Respondkuponoj — Oficperada
 Servo — Hotela Servo — Turisma Servo — Statistika
 Servo — Vojaĝa Servo.

Teritoria Oficejo por Ĉeĥoslovakio Hradec Králové 628-a.

NIA SILVESTRO KAJ NOVA JARO.

La 31-an de Oktobro finiĝas la administra jaro de UEA. Decas, ke ni rerigardu al la ŝus pasinta jaro. Tio ne estas por ni malfacile, ĉar ni kutimas dum la tuta jaro noti ĉion notindan kaj statistiki ĉion statistikeblan. Sekve de tio ni facile povas hodiaŭ konstati, ke la jaro ĵus pasinta estis preskaŭ la sama kompare kun la jaro 1929 konsiderante la laboron plenumitan de nia teritoria oficejo. La rezulto varba estis iomete malpli granda; parte pro la rerura ekonomia krizo, kiu devigis ankaŭ multajn esperantistojn ŝpari ĉie, kie estis eble, ankaŭ en la kotizoj, parte pro la prahaa opozicio kontraŭ UEA-sistemo en la uzado de lokonomoj en niaj jarlibroj kaj fine ankaŭ pro la pli—malpli konataj atakoj kaj kalumnioj de la fama doktorino kaj ŝiaj disĉiploj. La novan administran jaron ni eniras sen melankolio, kun forta volo konvinki la ĉeĥoslovakajn esperantistojn, ke Universala Esperanto-Asocio estas organizaĵo ne nur necesega kaj utila, sed absolute serioza kaj starigita sur ĝustaj kaj justaj principoj kaj fundamentoj.

Ni dezirus, ke ĉiuj niaj membroj por momento enrigardu la teritorian oficejon, kiu prezentis dum la lastaj tagoj tute apartan bildon. Sur la longa labortablo amasego da flugfolioj kaj la tuta familio harmonie ĉirkaŭsidis kaj laboras furioze: La adresoj jam delonge estis preparitaj sur papero gluita, kaj jen la edzino gluas ilin sur la kovertojn. La infanoj energie klopodas venki unu la alian en velfaldado de la cirkuleroj. La servistino faras la samon, sed tute frankvile, sciante pri sia absoluta supereco. La patrino sidas — ĉar malsana — apude kaj observas la laboremulojn, sed baldaŭ komencas enui, dume mi, la feliĉa patro kaj oficejestro provas seninterrompe skribadi per la skribmaŝino, sed la okuloj vole-nevole strabas al la tablo, la brusto fiere larĝiĝas kaj la koro ĝoje saltas en ĝi: Jen kia oficejo! Kiom da laborantoj! Kiom da humoro! La horoj pasas rapide kaj jen

arigas la kovertoj afrankotaj. Gluado de poŝtmarkoj ne estas agrabla laboro, sed ankaŭ ĝi devas kaj estas farita kaj du mil kovertoj estas sendpretaj. Mirigitaj ni staras super kvar paketoj po kvin cent kovertoj. Tiom da laboro kaj jen la malgranda rezulto! Ĝardenon ni estus plugintaj (se ni havus ĝin), vestaĵon ni estus kudrintaj kaj multajn aliajn aferojn ni estus prizorgintaj kaj anstataŭ tio... jen, nur kvar malgrandaj paketoj po kvin cent kovertoj! Ĉu ni bedaŭru la energion foruzitan? Tute ne!

Morgaŭ la poŝtoŭficejo afable akceptos niajn karajn kovertojn kaj postmorgaŭ, la 4-an de Novembro 2000 esperantistoj en ĈSR ricevos nian senditaĵon. Se ili — ĉu ankaŭ vi, kara leganto, estas inter la du miloj? — legos ĝin kun sama fervoro kaj intereso, kiel ni ĉion prizorgis, se ili ĉiuj agos laŭ nia invito, tiam ni estos feliĉaj, ĉar ni vidos, ke nia laboro ne estis vana. —

Kiu el vi ne ricevis nian flavan cirkuleron, aŭ la specialan, sennumeran eldonon de „Esperanto“, skribu al ni kaj ni sendos la mankantan. Sendante vian aliĝilon, sendu samtempe vian kotizon; sendante vian kotizon, sendu samposte ankaŭ aliĝilon. Se vi aliĝos kaj pagos antaŭ la 31. Januaro 1931 ni konsideros vin frupaginto kaj kiel tia vi rajtas elekti unu el la premioj por frua pago. Se vi estas amanto de nia lingvo, tiam nepre elektu la libreton de Dro Privat „Esprimo de sentoj en Esperanto“, kiun vi legos, studos kun vera gusto. Ĉi tiun premion vi ricevos de ni tuj, ĉar ni havas provizon da ili — la aliajn ni devas mendi en eksterlando.

Denun ni havas propran konton ĉe Poŝta Sparkaso en Brno No 110.878 kaj ties poŝtpagilojn ni dissendis. Tamen vi povas senoi la monon por nia konto ĉe Živnostenská banka en Hradec Králové, se vi posedas niajn malnovajn poŝtajn pagilojn.

Stato de UEA en nia teritorio la 31. Oktobro:

1930		1929
1	Dumviva Membro	1
15	Membroj-Subtenantoj	12
917	Membroj-Ābonantoj	960
361	Membroj	379
<u>1294</u>		<u>1352</u>
		Skl.

POR KURSANOJ.

Ne ĉiu scias, ke...

...per preciza mezurado kaj kalkulado oni konstatis, ke la virino, alta 150 centimetrojn, devas pezi kvindek kilogramojn. Por ĉiu plua centimetro de la alteco oni alkalkulas la pezon de tri kvaronoj da kilogramo. Laŭ tio la virino alta 160 centimetrojn devus pezi 57½ (kvindeksep kaj duonon) da kilogramoj. Kio estas plia, ne estas ĝusta.

...odoron de la butero kaŭzas aĝado de bakterioj. Precizaj serĉoj de holandaj esploroj Riel, Kluyperk kaj Derk montris, ke la odora materio estas sole du ĝis kvin dekmilonoj da procento el la pezo de la butero. La bakterioj estas kultureblaj sur ĝrasa bazo kaj la esplorantoj esperas, ke kulturante ilin, ili sukcesos doni buteran odoron ankaŭ al ĝrasoj artefaritaj.

...Ĥinoj dividas la tagon en dekdu partoj po du horoj.

...el unu kilogramo da sapo oni povas fari 50.000 sapovezikojn.

...ĉiu homo en Eŭropo, inkluzive la infanojn, konsumas meznombro ok alumetojn ĉiutage.

...ke mil kilogramoj da akvo en Atlantika oceano enhavas 36.75 kg da salo.

...ke en la granda nubskrapulo Equitable Building en New York estas pli da telefonaparatoj ol en la tuta Bulgario.

...ke la Negroj en Ameriko eldonas cent ĵurnalojn kaj 14 ilustritajn gazetojn.

...ke sur la insulo de Robinson Crusoe, nomata Juan Fernandez, kiu kuŝas de Valparaiso kelkon da tagoj da vojaĝo, estas baldaŭ konstruota granda hotelo por turistoj.

Parizano venis kun kamparano sub la turon de Eiffel kaj diras: Rigardu, la turo estas alta tricent metrojn kaj, ĉu vi scias homo, ke mi tie vidas muŝon? Ĝuste sub la flago?

Mi ne vidas ĝin, sed ankaŭ scias, ke ĝi tie estas.

Kiel vi povas tion scii ne vidante ĝin?

Mi aŭdas ĝin, ĝi promenas tie.

LINGVA FAKO

MOCI, SMĚTI, MITI, MUSETI.

Ne nur komencantoj, sed ankaŭ progresintoj estas ofte en embaraso, se estas tradukotaj la esprimoj:

ĉ. Moci, směti, míti, museti.

g. können, dürfen, sollen, müssen

En naciaj lingvoj tre ofte estas eble anstataŭi unu esprimon per alia, ekz. oni povas ofte samsence diri: „To mohl udělati“ kaj „To směl udělati“, g. „Das hat er tun können“ kaj „Das hat er tun dürfen“.

La esprimo „moci — können“ en sia propra senco estus tradukota per „povi“, kiu esprimo povas esti anstataŭata per „kapabli“, se en la nacia lingvo oni povas diri: „býti s to“, „býti schopen“, g. „fähig oder imstande sein“. Nur se la esprimo „moci — können“ estas uzata anstataŭ „směti — dürfen“, oni devas traduki ĝin per „rajti“ aŭ „esti permesite“.

Same oni povas ofte anstataŭi „míti — sollen“ per „museti — müssen“ ekz. „To neměl dělati“ kaj „To nemusel dělati“, g. „Das hat er nicht tun sollen“ kaj „Das hat er nicht tun müssen“. Sed en ĉi tiuj okazoj oni sentas jam ian diferencan nuancon inter la menciitaj du esprimoj kaj tial estus dezirinde, ke E. nepre klopodu traduki la frazojn tiel precize, ke ankaŭ en E. estu esprimita la menciita nuanco.

Plej ofte estas malĝuste uzata la esprimo „ne devi“, jen en la senco: „nemuseti“ — „nicht müssen“, jen en la senco: „nesměti“ — „nicht dürfen“. Esperantistoj sekvas en ĉi tiuj okazoj la ekzemplon de latinidaj lingvoj, en kiuj la negativa verbo „ne devi“ signifas ne nur, ke io ne estas necesa, sed ankaŭ, ke ĝi estas malpermesita; la ĝusta senco devas esti divenata laŭ la kunteksto. Sed artefarita lingvo devas esti nepre logika kaj konsideri, ke, se iu ne havas devon (ne devas) fari ion, tamen li povas havi rajton (povas rajti) fari ĝin; do se oni volas esprimi, ke io estas malpermesita, oni devas diri, ke oni ne rajtas fari tion. Ankaŭ Germanoj sentas neceson de la menciita diferencigo. Tion pruvas la neologismo „darfi“, kiu ne estas necesa, se oni povas anstataŭi ĝin per „rajti“; sed se la subjekto de la koncerna frazo ne estas persono, estas tamen necese uzi la neologismon „darfi“, krom se oni povas anstataŭi ĝin per la frazo: „ne estas permesite“. Estus malĝuste

diri ekz.: „La fenestroj ne rajtas esti malfermataj.“ Iu eble dirus: „La fenestroj ne povas esti malfermataj“, sed tio estus malĝusta, ĉar oni kapablus ja malfermi la fenestrojn, sed oni ne rajtas fari tion. Tial estus ankaŭ malĝuste diri: „La fenestroj ne devas esti malfermataj“, ĉar temas pri malpermeso. Laŭvorta traduko povas do teksti sole: „ne darfis“.

Kiel traduki la esprimon: „míti — sollen“, tre bone klarigas Kühnl en sia lernolibro. Precipe mi atentigas pri la participo „—ota“, kiu esprimas ian gradon de devo; komparu tiurilate la klasikan ekzemplon: „Kambio pagota“, ĉ. „Splatná směnka“, g. „Fälliger Wechsel“. La klopodo enkonduki novan sufikson „—enda“ ne estas do necesa, ĉar „—ota“ tute sufiĉas.

Mi almetas vicon da frazejoj kun peto, ke la legantoj provu ilin traduki, kaj sendi la tradukojn al la redakcio. La plej taŭgajn ni represos.

ĉ e ĥ e:

germane:

- | | |
|---|---|
| 1. Smím, ale nemusím. | Ich darf, aber muss nicht. |
| 2. Smím, ale nemohu. | Ich darf, aber kann nicht. |
| 3. Mohu, ale nesmím. | Ich kann, aber darf nicht. |
| 4. Pouze členové spolku mohou se účastniti. | Nur Vereinsmitglieder dürfen teilnehmen. |
| 5. Pro nemoc nemohl přijíti. | Wegen Krankheit konnte en nicht kommen. |
| 6. To nemohl udělati. | Das konnte er nicht tun. (Das hat er nicht tun können.) |
| 7. To nesměl udělati. | Das durfte er nicht tun. (Das hat er nicht tun dürfen.) |
| 8. To neměl udělati. | Das sollte er nicht tun. (Das hat er nicht tun sollen.) |
| 9. To nemusel udělati. | Das musste er nicht tun. (Das hat er nicht tun müssen.) |
| 10. To by nemohl udělati. | Das könnte er nicht tun. (Das würde er nicht tun können.) |
| 11. To by nesměl udělati. | Das dürfte er nicht tun. (Das würde er nicht tun dürfen.) |
| 12. To by neměl udělati. | Das sollte er nicht tun. (Das würde er nicht tun sollen.) |
| 13. To by nemusel udělati. | Das müsste er nicht tun. (Das würde er nicht tun müssen.) |

- | | |
|-----------------------------------|-------------------------------------|
| 14. To by nebyl mohl udělati. | Das hätte er nicht tun können. |
| 15. To by nebyl směl udělati. | Das hätte er nicht tun dürfen. |
| 16. To by nebyl měl udělati. | Das hätte er nicht tun sollen. |
| 17. To by nebyl musel udělati. | Das hätte er nicht tun müssen. |
| 18. To se nemuselo státi. | Das musste nicht geschehen. |
| 19. To by se nemuselo státi. | Das müsste nicht geschehen. |
| 20. To by se nebylo muselo státi. | Das hätte nicht geschehen müssen. |
| 21. To se nemělo státi. | Das sollte nicht geschehen. |
| 22. To by se nemělo státi. | Das sollte (konj.) nicht geschehen. |
| 23. To by se nebylo mělo státi. | Das hätte nicht geschehen sollen. |
| 24. To se nemohlo státi. | Das konnte nicht geschehen. |
| 25. To by se nemohlo státi. | Das könnte nicht geschehen. |
| 26. To by se nebylo mohlo státi. | Das hätte nicht geschehen können. |
| 27. To se nesmělo státi. | Das durfte nicht geschehen. |
| 28. To by se nesmělo státi. | Das dürfte nicht geschehen. |
| 29. To by se nebylo smělo státi. | Das hätte nicht geschehen dürfen. |
| 30. Smělo se to státi? | Durfte das geschehen? |

Karafiát.

25. TRADUKO.

Nacieco kaj internacieco. Inter la nacieco kaj la internacieco ne estas kontrasto,¹⁾ sed harmonio¹⁾; la nacioj estas naturaj organoj de la homaro. La homaro ne estas io supernacia,²⁾ ĝi estas organizo³⁾ de individuaj⁴⁾ nacioj. Se do la apartaj nacioj klopodas⁵⁾ por sia memstareco⁶⁾ kaj penas detru⁷⁾ la ŝtatojn, en kiuj ĝis nun ili estis, tio ja ne estas batalo kontraŭ la internacieco kaj la homaro, sed batalo kontraŭ la subpremantoj⁸⁾, kiuj misuzadis⁹⁾ la ŝtatojn por niveligo kaj politika unuformeco. La homaro ne marŝas¹⁰⁾ al unuformeco, sed al unueco; kaj ĝuste¹¹⁾ la memstariĝo¹²⁾ de la nacioj ebligas la organan asociigon, la federon de l' nacioj, de Eŭropo kaj de la tuta homaro. T. G. Masaryk.

Poznámký:

1. též: malakordo, kontraŭo; la nacieco kaj la internacieco ne staras kontraŭ si (ne kontraŭstaras), sed, male, ili harmonias,
2. též: estas nenio supernacia.
3. též: organizaĵo,
4. též: unuopaj, apartaj, singlaj
5. též: klopodas akiri...; celas sian memstarecon, penas pri...
6. též: sendependeco
7. též: disrompi, disbati
8. nikoli: subpremuloj = subpremanto i subpremafo
9. též: malbonuzadis; nikoli: maluzadis, mal znaĉi opak, zneužívati není opak užívati, nýbrž špatně, zle užívati; trouzi — nadužívati = uzi tro multe, tre ofte
10. též: tendencas, celas, direktiĝas
11. nikoli: ĵus = antaŭ tre mallonga tempo: Mí ĵus legis; též nikoli ĝus (není esp. slovo).
12. emancipi užíváme spíše: emancipita junularo, emancipita virino

I na tomto překladu účastnilo se značné množství čtenářů a čtenářek, celkem 25 osob: Brettschneider Olomouc, Čiperová M. Plzeň, Feldmannová M. Zlaté Moravce, M. Görtlerová Praha, A. Harna Želovce, Fr. Heikenwälder Prostějov, J. Hladký Karvinná, J. Hřebíček Benešov, E. Klubo Hradec Králové, E. K. Kladno, J. Kosina Praha, J. Kozlová Praha, Dr. J. Kristen Praha, F. Kuba Olomouc, F. Kučera Kunovice, F. Machala Pržno, Fr. Dytloun Bakov, J. Reitmajer V. Leváre, Kursanov Smíchov, V. Střihavka Kladno, M. Silhánková Plzeň, A. Štěpán Hostivař, A. Tyl Prostějov, Fr. Všeticka Určice, X. Bratislava.

Z mnoha dobrých prací jsme vylosovali práci pana F. Machaly v Pržně. Zaslali jsme mu odměnou knihu Internacia Dialogaro.

Odpovědi na některé dotazy:

Člen 1a. Podrobné pojednání o užívání členu najdete v Progresu ročník VIII (1925). Lze dostat za sníženou cenu 12 Kč. Doporučujeme.

Synonyma. Podle čeho říditi výběr z většího počtu synonym (slov souznačných)? Vyběříme to, které se nám lépe zdá vyjadřovati danou myšlenku.

L' v próze: de l' nacioj, možno použiťi; doporučuje se však užívání omezení jen na řeč básnickou.

Překlad 26. uveřejníme v příštím čísle. Váš překlad můžete nám zaslati ještě do 20. prosince.

S-ro ANT. KUDELA

en Olomouc atingis la 21. Novembro 1930 sian 60-an jaron. Fidela adepto de Esperanto, konsciencia kaj diligenta laboranto en Olomouc, prezidanto de la loka Esperanto-Societo, Delegito de UEA, komitatano de CAE kaj kunlaboranto en la eldona Societo Moraviaj Esperanto Pioniroj, li estas ŝatata de ĉiuj, kiuj konas lian modestan kaj malegoisman agadon. La redakcio de La Progreso esprimas siajn sincerajn bondezirojn, dezirante ankoraŭ multajn jarojn!

Dr. CESTMIR PARMA,

ĉefkuracisto de la Ŝtata instituto por dentkuracado (stomatologio) en Praha, ŝatata kunlaboranto de la Progreso kaj de la Internacia Medicina Revuo, eldonis sciencan verkon „Zahnärztliche Roentgen-diagnostik“ (granda oktavo, 260 p.) ĉe Urban-Schwarzenburg Wien—Berlin. La verko temas pri esplorado de malsanoj de dentoj kaj makzeloj per rentgeno; ĝi enhavas multajn rentgenogramojn en senriproĉa pretego. La specialistaj rondoj eŭropaj laŭdas la originalecon de la materio kaj multajn novajn trovojn. La libro aperinta en novembro 1929 estas jam preskaŭ elĉerpita. Dr. S.

NASKIĜO.

Al Gesinjoroj Konvalina V., fervoja oficisto en Josefův Důl—Kosmonosy, naskiĝis filineto Bohunka. Ni gratulas.

Al geedzoj Dvořákček, Nechanice naskiĝis filo nomita Boris. Gratulon!

VOJAĜADO TRA ĈEĤOSLOVAKIO
PER ESPERANTO.

The Central European Observer, angla semajna revuo aperanta en Praha alportas en sia nro 45/1930 represon de artikolo, per kiu nia brita amiko J. F. O'Conor partoprenis la konkurson „Mia somera libertempo“, aranĝitan de la angla magazino The Everyman.

La artikolo parolas pri la nunjara vizito de s-ro Conon al Ĉeĥoslovakio, ne ŝparas laŭdon pri ĉio vidita kaj akcentas speciale la avantaĝon, kiun li ĝuis pro sia scio de esperanto.

Samideano Vitek el Konecchlumí havis la bonan ideon inviti kelkajn siajn korespondantojn eksterlandajn al samtempa vizito. Ili konsentis kaj tiel per simplaj rimedoj estis aranĝita en malgranda vilaĝo apud Jičín internacia rendevuo. Per helpo de samideanoj kaj precipe de la akompaninta s-ro Vitek konatiĝis

la fremdlandaj esperantistoj kun la ĉefaj vidindaĵoj en parto de orienta Bohemio, vizitis kelkajn kastelojn, la tiam okazintan vitroindustrian ekspozicion en Turnov, rigardis la ĉefurbon kaj vojaĝis al kelkaj interesaj lokoj, kuŝantaj okcidente de Praha.

La rakonto pri la lerte farita vojaĝo tra lokoj ne kuŝantaj sur la kutima vojo de eksterlandaj turistoj pruvas faktori al ni konatan, ke turismo tra Ĉeĥoslovakio por uzanto de internacia lingvo estas afero plej oportuna kaj feliĉe jam ankaŭ praktikata. En preskaŭ 400 lokoj ĉeĥoslovakaj atendas kun ĝojo la gastojn la delegitoj de UEA.

Per tosto al Ĉeĥoslovakio kaj esperanto finas tiu artikolo konatiganta la anglan publikon kun tiu fakto. O. G.

PER BALONO AL LA POLUSO ANDRÉE-LIBRO EN ESPERANTO.

La Eldona societo Esperanto en Stockholm aperigas dum ĉi tiuj taĝoj grandan verkon pri trovo de la kuraĝa sveda esploristo Andrée kaj tekstojn de la deĉifritaj taglibroj en esperanta traduko. Disvolviĝas antaŭ ni detaloj de dramo, kiuj dum 33 jaroj estis mistero. Scienca kaj samtempe kortuŝa priskribo de la travivaĵoj. Enestas kopioj de fotoj faritaj antaŭ 33 jaroj. Atentinde estas, ke esperanta eldono de tiu grava verko aperas kun 12 tradukoj en lingvoj aliaj samtempe.

La administracio de La Progreso akceptas jam nun mendojn por la granda, lukse ekipita volumo 400 paĝa. Broŝurita ekzemplero kostas sv. kr. 9.50 (Kĉ 90.—), bindita sv. kr. 12.— (Kĉ 110.—) inkl. afranko.

Jen okazo por niaj kluboj. Haviĝu tiun ĉi libron por viaj bibliotekoj. La membroj, kiuj ne povas mem aĉeti la libron, atendas tiun servon de vi. Ni organiziĝas ja por atingi komune tion, por kio individua samideano estas tro malforta.

Velký slovník esperantsko-český od J. Filipa již vyšel. Má více než 400 dvousloupových stran a stojí pouze 40 Kč (vázaný 50 Kč). Opatřete si.

Plena Vortaro de Esperanto aperis ĉe SAT. Verkis ĝin prof. E. Grosjean-Maupin, A. Esselin, S. Kornfeld kaj prof. G. Waringhien. 536 p. formo kaj formato de la fama Kabevortaro. Prezo: bindita 80 Kč. Ni varme rekomendas al ĉiu esp. laboranto kaj nepre al ĉiu kluba biblioteko. Favoraj pagokondiĉoj ĉe la adm. de Progreso.

Klíč esperanta (český) vydaný Čs. Esp. Institutem v Praze II. Křemencová, 17. stojí 100 výtisků 50 Kč (a nikoli 100, jak bylo omylem vyšázeno v minulém čísle.)

Slovenský klíč esperanta stojí 100 výtisků 80 Kč. Vydal Svaz. Zasilá za předem zaslaný obnos Dr. Stan. Kamaryt, Bratislava, Telocvičná, 3. Jedn. výtisk 1.20 Kč.

Slovaka traduko de la Fundamento, verkita A. Škarvan, estas ricevebla ĉe Esperanto-Klubo Bratislava, Vydrice strato po Kč 10.60 afrankite.

Demandoj al la legantoj.

1. Kion vi unue legas ricevante freŝan numeron de La Progreso?

2. Kion vi esperis trovi en la nuna numero, sed ne trovis?

3. Kion en la nuna numero vi trovas plej multe interesa por vi?

Kiu rajtas respondi?

Ĉiu leganto.

Kiel vi respondu?

Prefere sur simpla poŝtkarto. En esperanto aŭ ĉeĥe.

Kial ni metas tiujn ĉi demandojn?

Por ekligi pli multajn rilatojn inter la redaktantoj kaj la legantoj. Por doni okazon, ke niaj legantoj skribu al ni siajn proponojn, dezirojn, kritikojn.

Ĉu almenaŭ 10 legantoj skribos?

Fino de la jarkolekto proksimiĝas.

Ni rec, insiste, petas ĉiujn ŝuldantojn, ke ili fine bonvolu pagi siajn abonojn. Ĉiu aparta admonilo kostas al ni nur perdon de tempo kaj plia nomo.

Leterujo. Fr. P. en B.: Dankon por la atentigo. La informon ni publikigos. — Dr. J. F. en P.: Koran dankon por la bona artikolo, sed vi mem vidas, ke ĝi nun jam ne estas aktuala. — F. V. en B.: Kial vi, sciante ke vi, ŝuldas la abonon, ne informis nin pri ŝanĝo de via adreso? Ofte oni plendas pri nericevo de la gazeto, sed tute forĝesas informi nin, ke oni loĝas jam en tute alia loko. La poŝto resendas tuj la numeron al ni, sed kien ni sendu ĝin, por ke ĝi trovu vin, perdiĝintan? — F. K.: Por povi diri, ĉu ni publikigos, ni bezonas antaŭe vidi la manuskripton. — J. H. en P.: Koran dankon por la sendaĵo.

Sendube

ĉiuj ŝatantoj de la Esperanto-literaturo legos avide la gazeton

Literatura mondo

ĉar ĝi estos la plej bela, pure literatura gazeto en Esperantujo.


Ĉian valoron garantias la ĉefredaktoroj;
Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay

la regulaj kunlaborantoj: J. C. Applebaum, A. Behrendt, P. Bennemann, Miŝu Beraru, Jozefo Berger, M. Blassberg, K. Bodó, T. Cart, Helmi kaj Hilda Dresen, R. Eichenbaum, Jean Forge, S. Grenkamp, L. Halka, R. Hromada, Teo Jung, I. Jurysta, S. Karmarj, E. Knutsson, I. Lejzerowicz, W. Lippmann, T. Morariu, P. Nylén, Kenelm Robinson, Jan van Schoor, K. R. C. Sturmer, J. Šupichová, Raymond Schwartz, F. Szilágyi, L. Totsche, E. Wiesenfeld, Felikso, Leono kaj Lidja Zamenhof kaj aliaj famaj verkistoj.

Unua numero aperos la 1-an de januaro 1931. — Aperas monate. — Formato: 31×23 cm, sur 16—24 paĝoj. — Abonprezo: 60 Kč.

Agentoj en ĉiuj landoj.

Postulu senpagajn specimenon kaj prospekton ĉe la eldonejo de La Progreso aŭ ĉe administracio de Literatura Mondo, Bleier Vilmos, Budapest IX, Boráros tér 6. IV. 11., Hungarujo.



Pro děti, jako dárek, hodí se nejlépe
kniha moderních sportovních pohádek

Lojzik Vydrák

Úplně nové skvělé pohádky, jimiž děti jsou úplně strženy. Odpovídají přirozenosti dnešního dítěte, odvážného, podnikavého. V pohádkách žijí zázračné stroje, auta, letadla, rakety, pomocí nichž čilý Vydrák, vyrostlý na naší Lužnici, podniká neobyčejně dobrodružné cesty.

Zábavná i poučná kniha!

K dostání ve všech knihkupectvích.



MENDU: Kč

- J. Herben: Malriĉa knabo, kiu gloriĝis (bibliografio de Masaryk) 16.—
- Dr. E. Privat: Historio de Esperanto (1900—27), 200 p. lukse bind. 48.—
- Remarque: En Okcidento nenio nova . 45.—
- Wels: La dormanto vekigás. Broŝ. . . 40.—
- Ŝilba: Uĉebnice esperanta se slov. . . 10.60
- Kühnl-Procházka: Slovník česko-esp. váz. 25.—
- Čánský-Riedl: Slovník esper.-český . . . 21.—

Staĉi napsat objednávku na složenku Progresu.

Knihkupectví Jan Minář, Nymburk.

MENDU LIBROJN POR TAGO DE LIBRO!

- HUNGARLINGVAJ ESPERANTO-LIBROJ!**
- Polgár: Esperanto Tanfoliam husz leckében Kč 13.40
 - Dro Schatz: Magyar-Esperanto Zsebszótár Kč 13.40
 - D. Bánó: Az eszperanta nyelvtana hat leckében Kč 2.40
 - Robicsk: Esperanto-Kulcs Kč 1.90
 - Dro Schatz: Kis Magyar-Esperanto Szótár Kč 1.90
 - Dro Tóth: Az Eszperanto Hivatalos Szógyökeinek Szótára Kč 4.30

Ricevebla ĉe

Teritoria Oficejo de U. E. A.
Hradec Králové 628-a.



K různým esperantským slavnostem,
na výlety atd., objednejte si

ESPERANTSKÝ ZPĚVNÍČEK

„KANTARETO“

Sestavil J. Filip. — Cena 1 výtisku Kč 7—, 10 výtisků za Kč 50— včetně poštovného.
Zasílá: Fr. Buhr, Praha XVIII., Břevnov 514:
Účet pošt. úřadu šekového 209.037.

Zpěvníček obsahuje mimo písně duchovní a esperantské hymny, zvláště mnoho našich československých národních písní.

